

Lingvopolitiko kaj nacia identeco en socialisma Jugoslavio (1945-1991)

kaj la rolo de la serbkroata lingvo

Originale verkita en Esperanto de Andreas Künzli¹

Jugoslavio estis kompleksa kaj pedante ekvilibrigata multetna ŝtato kun 6 respublikoj, 5 popoloj, 4 lingvoj, 3 religioj, 2 alfabetoj kaj 1 partio, kiel oni iom ŝerce diris. Se temas pri la lingvoj, la serbkroata (aŭ kroatserba) lingvo² estis parolata en Kroatio, Serbio, Bosnio-Hercegovino kaj Montenegro, dum la pli malgrandaj lingvoj slovena estis uzata nur en Slovenio, makedona en Makedonio kaj albana en Kosovo, kie ili havis oficialan statuson. Sed la serbkroata (aŭ kroatserba) lingvo ĝuis iusence superrangan kaj privilegiatan statuson, ĉar ĝi estis uzata ankaŭ sur la niveloj de la federacia politiko, en la armeo kaj ekonomio *por la komuna interkompreno*, kio faris el ĝi praktike kvazaŭ tutjugoslavian lingvon, kiun oni utiligis ankaŭ en Slovenio, Makedonio kaj Kosovo. Krom tio, la diraĵo pri la 4 lingvoj havis hokon, ĉar iuj kroatoj parolis pri kroata lingvo, iuj serboj pri serba lingvo, kio faris el kvar do kvin lingvojn, kaj ekzistis eĉ aserto, ke la montenegra lingvo estas aparta lingvo (vidu pli sube).

Laŭ tiuj premisoj oni vidas kaj povas imagi, ke lingvaj demandoj kaj problemoj estis daŭre aktualaj temoj en Jugoslavio, ne nur dum la socialisma tempo de Tito sed ankaŭ jam antaŭ la dua mondmilito. La 'lingva demando' do formis integran parton de la 'nacia demando' kaj de la 'jugoslavia demando' entute, pro kio ĝi havis altrangan signifon en la interna politiko kun granda potencialo por diversaj kvereloj.

Trakti lingvopolitikajn aferojn estis rezervite precipe al kelkaj jugoslaviaj politikistoj, ideologoj kaj lingvistoj, etnologoj kaj verkistoj, kiuj sentis sin kompetentaj, dum la decidoj pri tiaj demandoj estis faritaj plejparte ekster la publikeco, t.e. sen demokratiaj konsultado kaj interkonsento.

La popoloj de Jugoslavio estis pli malpli devige kuntenataj en artefarita ŝtato per la ideologia moto *bratstvo i edinstvo* (frateco kaj unueco), kio funkciis tiel longe kiel Tito regis kaj vivis kaj la komunistoj havis la politikan monopolon. Iuj samtempoj asertis, ke la lingva demando estis la ĉefa kaŭzo de la intertnaj konfliktoj kaj de la jugoslavia krizo,³ kiu akriĝis jam dum la vivotempo de Tito kaj post lia morto (1980) akcelis la disfalon de la tuta ŝtato, havante centrifugan efikon, por kulmini en la sangaj militoj de la 1990aj jaroj en la balkanaj landoj, kiuj tragike disŝiris la jugoslaviajn naciojn kaj naciecojn laŭ diversaj memstaraj ŝtatoj en la limoj de la iamaj jugoslaviaj respublikoj.

Post la disfalo de Jugoslavio la serbkroata aŭ kroatserba lingvo restis limigata al la uzado en la kernaj respublikoj, kie tiu lingvo estis parolata de siaj titoloj popoloj, dum ĝi perdis sian iaman kvazaŭ superrangan statuson aŭ superregan rolon en eksa Jugoslavio, kie la signifo de tiu lingvo mem ŝanĝiĝis: La serbkroata aŭ kroatserba lingvo ne plu okupis la pozicion kiel ilo por la komuna intertna interkompreno, sed fariĝis la simbolo por la aparteno al konkreta nacio. Per tiu modifo de la paradigmo kaj interpreto aŭtomate malaperis en la koncernataj landoj ankaŭ la marksisma kompreno pri la lingvo, kiu jam de longe perdis sian validecon en okcidenta Eŭropo.⁴

Multe malpli konataj ol la nekredeblaj 'eksteraj' okazaĵoj de la 1990aj jaroj estas la diversaj 'internaj' lingv(istik)aj debatoj en socialisma Jugoslavio, kiuj okazis plej malfrue ekde la 60aj jaroj. Pri ili esence temas la ĉi-sekva dia- kaj sinkrona traktaĵo.

¹ Temas pri esperantigita versio de germanlingva recenzo de la libro de Ksenija Cvetković-Sander pri la jugoslavia lingvopolitiko inter 1945 kaj 1991 (Harrassowitz 2011), kiun mi verkis en pli fruaj jaroj kaj publikigis sur www.osteuropa.ch.

² Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Serbo-Croatian>.

³ Pri la veraj kaŭzoj de la disfalo de Jugoslavio ekzistas kontraŭdiraj opinioj. Dum kelkaj fakuloj serĉis la kaŭzojn de la disfalo de Jugoslavio precipe en la komplika nacia (etna) demando, al kiu apartenis la problemoj de la lingvo, religio, kulturo kaj identeco, aliaj kredis, ke la pli kaj pli nesolveblaj politikaj, ekonomiaj, ideologiaj kaj sistemaj antagoismoj kondukis al la fiasko de Jugoslavio.

⁴ Laŭ http://bib.irb.hr/datoteka/426566.NATIONALE_VARIETATEN_DER.PDF.

Situacio en la 19a jarcento

La historio de la estiĝo kaj kodigo de la sudslavaj lingvoj estis dekomence ligata kun politikaj interesoj kaj demandoj de la reciproka etna dispartigo. Ĉe la slovenoj legendecaj figuroj kiel la protestantisma reformisto Primož Trubar (16a jc.), poste Jernej Kopitar (unua duono de la 19a jc.), France Prešeren (1800-1849) kaj Ivan Cankar (1876-1918) enkondukis propran lingvan itineron por la slavoj de Krajno kaj Stirio por apartigi sin de la germana kaj kroata lingvoj (precipe kajkava⁵). Pli sude agadis Vuk Stefanović Karadžić (1787-1864), etnologo, diplomato kaj aŭtodidakto, kiu modernigis la serban popolan lingvon, kiu ankoraŭ troviĝis en la tradicio de la ruse redaktata eklezislava lingvo kaj uziĝis en la formo de la arkaika slavserba (slavenosrpski) lingvo, kiun Karadžić kontraŭbatalis. Sendepende de ilia religio, Karadžić konsideris la ŝtokavanojn serboj, la kajkavanojn slovenoj kaj nur etan grupon de la parolantoj de la ĉakava lingvo kroatoj.⁶ Per tio la lingvopolitikaj strebadoj de la slavoj estis ligataj kun la klopodo emancipiĝi de la german-habsburga, hungara kaj latina (lingvo-)hegemonio kaj la intenco integri la sudslavajn regionojn laŭ nova maniero. En tio aperis kontraŭstaro flanke de diversaj grupoj: ekzemple la kajkavanoj ne emis integriĝi en la slovena nacio. Samtempe la kroatoj (de Zagrebo kaj Ragusa en Dalmatio) evoluigis propran memstaran nacian konscion, baziĝante sur la kontinueco de la mezepoka kroatia ŝtateco. Kune kun la kroatoj kaj en diferenco kun la slovenoj, kiuj ne posedis ŝtatan tradicion kaj estis konsiderataj kiel „senhistoria popolo“, la serboj same pretendis la posedon de propra politika suvereneco. En la serba princlando en 1868 la ‚popollingvo‘ de Karadžić estis agnoskita kiel lingvo de la lernejo kaj administracio. Kvankam en Kroatio Ljudevit Gaj (1809-72) proponis novan ortografion, kiu ankoraŭ nun formas la bazon de la kroata alfabeto, la lingvo-koncepto de Karadžić estis finfine akceptita ankaŭ de la kroatoj. Tio signifis ankaŭ en la kroata filologio de la dua duono de la 19a jarcento alproksimiĝon inter kroatoj kaj serboj. Sed kiel la nova popollingvo, kiu komencis esti uzata de serboj kaj kroatoj, estu nomata? Ĉu en Serbio ĝi nomiĝu nur serba lingvo, en Kroatio nur kroata lingvo? Aŭ ĉu eble serb-kroata (kiel ĝi poste nomiĝos), ĉu ilira aŭ jugoslava lingvo? Por la kroata flanko ŝajnis, ke Ivan Kukuljević trovis trafan solvon per la propono (1861) nomi la lingvon „kroat-serba“ („hrvatsko-srpski“). En tiu tuta diskuto oni fakte okupiĝis nur ankoraŭ pri la diferencoj inter la ekava, ijekava kaj ikava versioj⁷ de la ŝtokava, kiuj devis esti konsiderataj ĉe la kodigo de la skriblingvo. Krom Ljudevit Gaj ankaŭ la zagreba juristo Ivan Derkos propagandis la hipotezon, ke la kroatoj posedas propran lingvon kaj ke la sukceso de ĉiu popolo estas ligata kun ĝia nacia lingvo. Kiel finan rezulton, la lingvopolitikaj elitoj de Kroatio perceptis komence de la 20a jarcento la kroatian kaj serban kiel unu lingvon, kvankam la kroatoj kaj serboj signifis por ili du diversajn popolojn, dum en Serbio oni kredis, ke la serba kulturo estas ĉie renkontebla, kie la serba lingvo estas parolata. Eĉ en Bosnio, kiu estis karakterizata de la muzulmana, turka kulturo, la projekto de Karadžić adoptiĝis sen problemoj, ĉar ĝi estis kreita surbaze de la dialekto de liaj antaŭuloj, la ijekava ŝtokava lingvo, kiu estis uzata en orienta Hercegovino. Pragmatisme oni nomis tie la slavan popollingvon bosn(i)a lingvo („bosanski jezik“). En 1890 tiu ĉi termino estis eĉ oficiale enkondukita de la aŭstra-hungara okupacia administracio, kaj ankoraŭ en la sama jaro aperis unua gramatiko de la bosna lingvo. Sed la bosniaj serboj akre kontraŭstaris la nomon bosna, kiun ankaŭ la katolikaj kroataj ne volis akcepti. Pro tio en oktobro 1907 la aŭstra-hungara registaro rezignis uzadi ĉi tiun terminon por nomi la landan lingvon kaj anstataŭigis ĝin per la termino serb-kroata („srpsko hrvatski“), tiel ke la gramatiko de Vuletić aperis kun la titolo ‚Gramatiko de la serb-kroata lingvo‘. La muzulmanoj rajtis oficiale nomi sian lingvon bosna. Sed tio ankoraŭ ne estis la fino de la diskuto. Mallonge antaŭ la unua mondmilito la lingva demando kaŭzis krizon en la bosnia-hercegovina parlamento, kiam oni postulis proklami la serb-kroatian ununura oficiala lingvo de la lando. Neniu plu parolis pri „bosn(i)a“ lingvo, sed la kroatoj nun postulis, ke la lingvo estus nomata „kroata aŭ serba“ („hrvatski ili srpski“) lingvo. Post kiam en 1911 la kroatoj interkonsentis kun la muzulmanoj pri ilia statuso en Bosnio, la kroatoj akceptis en 1912 la formon „serb-kroata“ kiel oficialan nomon de la lingvo.

Malgraŭ tiu lingva interkonsento, la etnaj kaj naciismaj tensioj daŭris ĉe la koncernataj popoloj. Dum slovenaj kaj kroataj lernolibroj detale rakontis la historion de la serboj, serbaj publikaĵoj ignoris la pasintecon de la kroatoj kaj slovenoj, kio tute ne plaĉis al ili. Tiel, dum ĝis la unua mond-

⁵ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Kajkavian>.

⁶ Vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Chakavian>.

⁷ Ekzemploj: lepo/lijepo/lipo (bela), veće/vijeće (konsilio), vesti/vijesti (novaĵoj) ktp. (vd. <https://en.wikipedia.org/wiki/Shtokavian>).

milito la lingvopolitikaj diskutoj en principo pace disvolviĝis, la etnaj kaj naciaj antagonismoj enhavis la neeviteblajn ĝermojn por la ontaj konfliktoj dum la jugoslavia tempo.

En la reĝlando de Aleksandro Karađorđević

Dum la kroatoj ĉiam denove – ĉu prave aŭ ne – atentigis per separatismaj tendencoj al siaj deziroj, ĉe la politike pli agresemaj serboj dekomence temis pri partnero, kiu intencis puŝi siajn ŝovinismajn interesojn per kruda kaj senskrupula perforto. Ĉi tiu fakto povas esti pravigita laŭ la ekzemplo de la fondo de la „Reĝlando de la serboj, kroatoj kaj slovenoj“, kiu estis proklamita de la princa reganto Aleksandro Karađorđević⁸ la 1an de decembro 1918 kiel sekvo de la korfua deklaro de la 20a de julio 1917⁹ kaj post kruda malrespektado de neserbaj argumentoj. Laŭ la konstitucio de 1921 la reĝlando komprenis sin kiel hejmlandon konsistantan el tri „triboj“, do kiel „trinoman nacion“ kun „serb-kroat-slovena (!) lingvo“. Kune kun tia novtipa ĉefnacio estis agnoskitaj ankaŭ iuj naciaj minoritatoj, krom la albanoj kaj makedonoj en „Sudserbio“. Ekde la komenco senkompate dominis la centrisma regadokoncepto, en kiu la serboj diktis la tonon. Precipe rilate la lingvon, la kurioza konstitucia ideologia principo de la „triunuo“¹⁰ ne estis realigebla, ĉar serb-kroat-slovena lingvo simple ne ekzistis. Tiel, dekomence ekestis paradoksa situacio. La nova koncepto signifis multe pli ankaŭ returnadon de la historiaj atingoj de la komuna serbkroata lingvonormo, kiu validis kaj en Serbio¹¹ kaj en Kroatio¹² kaj en Bosnio¹³. La slovena lingvo evoluis memstare disde la najbara serbkroata lingvo, kaj la registaro en Belgrado ankaŭ ne kontestis la apartecon de la slovena lingvo, kaj la slovenigo de Krajno kaj Stirio ne estis malhelpata. Okaze de la unua censo oni ankaŭ oficiale distingis inter „serbkroatoj“ kaj slovenoj. En 1919 en Ljubljana estiĝis slovenlingva universitato, kaj la slovenaj deputitoj rajtis uzi sian lingvon en la belgrada parlamento. La slovena estis agnoskita kaj establiĝis kiel tria sudslava skriblingvo krom la serbkroata kaj bulgara lingvoj. Malgraŭ tio, en Slovenio¹⁴ ankaŭ la serbkroata lingvo komencis ludi gravan rolon en la armeo, politiko, administracio kaj lerneja sistemo. Post kiam la slovenoj ankaŭ ne kritikis tiun influon, ekde 1922 la serba flanko senskrupule provis igi la slovenojn rezigni pri ilia idiomo. Ĉar la plimulto de la slovenaj intelektuloj pledis por la konservado de la slovena lingvo, tiurilataj serbaj elpaŝoj estis repuŝitaj kun ĉagreno. Tion oni ne faris sen proponi kompromisojn, ke la kroataj kaj serbaj oficistoj bonvolu lerni kaj uzi ankaŭ la slovenan lingvon. Koncerne la serbkroatan lingvon, en la reĝlando oni ŝajnis favori politikon de la „komuna evoluo de la popolo“ per „komuna lingvo“. En la realeco la kverelo pri opinioj estis daŭrigata precipe inter unuopaj serbaj kaj kroataj lingvistoj, kiuj povas esti nomataj unuflankaj naciismaj-fanatikaj pedantoj, ĉar en la praktiko temis esence pri demandoj de la zagreba aŭ belgrada prononco (do ekava/ijekava) kaj pri leksikaj problemoj. Evidentiĝis, ke la lingva demando estis (mis)uzata kiel preteksto por politikaj kaj naciismaj diskutoj. La politika situacio en la reĝlando pliakriĝis komence de januaro 1929, kiam Aleksandro Karađorđević post atenco kontraŭ si nuligis la konstitucion de 1921, malfon-dante la parlamenton kaj ŝanĝante la nomon de la ŝtato al „Jugoslavia Reĝlando“. Kiel sekvo de tiu puĉo estis enkondukita la t.n. reĝa diktaturo.¹⁵ La sola lingvopolitika reformo de la registaro

⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Alexander_I_of_Yugoslavia.

⁹ La teksto estas: 1e La Ŝtato de la Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj, kiuj estas ankaŭ konataj laŭ la nomo de Sudaj Slavoj aŭ Jugoslavoj, celas esti libera kaj sendependa reĝlando, kun nedividebla teritorio kaj unueco de la potenco. Ĉi tiu ŝtato estos konstitucia, demokratia kaj parlamenta monarkio, kun la dinastio Karađorđević, kiu ĉiam dividis la idealojn kaj sentojn de la nacio, metante super ĉio alia la nacian liberecon kaj volon ĉe sia pinto. 2e La nomo de ĉi tiu ŝtato estos Reĝlando de la Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj, kaj la titolo de la suvereno estos la Reĝo de la Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj. 5e La tri naciaj naciecoj, la Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj, estas egalaj antaŭ la leĝo sur la tuta teritorio de la reĝlando, kaj ĉiuj rajtas uzi ĝin en ĉiuj okazoj en la publika vivo kaj antaŭ ĉiuj aŭtoritatoj. 6e Ambaŭ alfabetoj, la cirila kaj latina, havas la samajn rajtojn kaj ĉiuj povas libere uzi ilin en la tuta teritorio de la reĝlando. La reĝaj kaj lokaj memadministrataj aŭtoritatoj rajtas kaj devas uzi la du alfabetojn laŭ la deziro de la civitanoj. 7e Ĉiuj religioj estas agnoskitaj kaj povas esti libere kaj publike praktikataj. La ortodoksa, romkatolika kaj muzulmana religioj, kiuj estas ĉefe konfesataj en nia lando, estos egalaj kaj ĝuas la samajn rajtojn rilate al la ŝtato. Konsiderante ĉi tiujn principojn, la Leĝdona periodo zorgos konservi la religian pacon kongrue kun la spirito kaj tradicio de nia tuta nacio. 11. Ĉiuj civitanoj tra la tuta teritorio de la reĝlando estas egalaj kaj ĝuas la samajn rajtojn rilate al la ŝtato kaj leĝo.

¹⁰ La ĉefa moto de la Reĝlando estis: „Unu popolo, unu reĝo, unu ŝtato“.

¹¹ Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Serbio>.

¹² Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Kroatio>.

¹³ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Bosnio_kaj_Hercegovino.

¹⁴ <https://eo.wikipedia.org/wiki/Slovenio>.

¹⁵ En 1934 Aleksandro mem pereis en atenco en Marsejlo. La atencinto ne estis jugoslavo, sed bulgaro.

koncernis la ortografian dekreton de 1929, kiu postulis kun la escepto de la slovena lingvo unuecan ortografion por la tuta teritorio de Jugoslavio.

Dua mondmilito sub la kroata Ustaŝa reĝimo

La relative mallonga sed des pli intensa periodo de la Dua Mondmilito, kiu alportis multe da suferoj al la popoloj de Jugoslavio, signifis kruelan cezuron ankaŭ en la lingvopolitiko de Jugoslavio. Post la agnosko de la traktato inter la tri potencoj fare de la jugoslavia registaro, partoj de Slovenio kaj Dalmatio estis okupataj kaj aneksitaj aŭ de la germanoj, hungaroj aŭ italoj. Serbio estis metita sub rekta germana armea administrado, Montenegro¹⁶ fariĝis itala vasala ŝtato kaj Makedonio¹⁷ estis aneksita de la bulgara ŝtato. En la okupataj german- kaj hungarlingve parolantaj regionoj de Slovenio la slovena lingvo estis malpermesata. Kiel marioneto de la Tria Regno sur kroata kaj bosnia teritorio estis proklamita la „Sendependa Kroata Ŝtato“, kiu estis diktatore regata de Ante Pavelić kaj lia faŝisma Ustaŝo.¹⁸ Sub Pavelić estis praktikata senprecedenca nacia ekstremismo, kies sekvoj estis la sanktigo de ĉio kroata kaj forpuŝado kaj subpremado de ĉiuj aliaj etnoj, precipe judoj, ciganoj kaj serboj,¹⁹ tiel ke oni devas paroli pri vera genocido rilate al tiuj popolgrupoj. La rekta enmiksiĝo de la Ustaŝa ŝtato en la lingvan politikon ampleksis la reguligon kaj purigon de la kroata lingvo. Kontraŭ la protesto de parto de la kroataj filologoj, kiuj pledis por la konservado de la fonologia ortografio, Pavelić ordonis la aplikadon de la etimologia ortografio. Pro manko de enketoj kaj esploroj estas malfacile diri, ĉu la kroata popolo akceptis tiujn lingvopurismajn intervenojn, same neklara estas la partopreno de kroataj lingvistoj en la faroj de la Ustaŝa reĝimo.

Jugoslavio sub la Tito-komunismo

Dum la dua mondmilito venis la horo por la komunistoj, kies teoriuloj kaj funkciuloj baziĝis sur la supozo, ke la nacia demando ne koncernas la laboristan klason kaj ke la proleta revolucio sekvigos la likvidon de la klasoj kaj de la burĝa nacio. Samtempe oni asertis, ke la nacia demando ne estas nur la afero de la burĝoj, sed interesas ankaŭ la komunistojn mem. En socialisma Jugoslavio, gvidata de la partizanoj de marŝalo Josip Broz Tito (1892-1980),²⁰ kiu estis filo de kroata patro kaj slovena patrino, la diskuto pri ĉi tiuj ideologiaj temoj estis traktata precipe de la sloveno Edvard Kardelj²¹ kaj de la montenegrano Milovan Đilas,²² kiuj kontribuis siajn proprajn – kaj tute kontraŭdirajn – vidpunktojn pri la nacia kaj klasa demandoj al ĝi. Kiel konate, la komunistoj baziĝis sur la principo de la egalrajteco de la popoloj. Kiam fine de novembro 1943 AVNOJ²³ decidis en Jajce (Bosnio) fundamenti la novan Jugoslavion sur la principo de la „demokratia federacio“, ĝi estis prifestata kiel „ŝtata komunumo de egalrajtaj popoloj“. Tiun egalrajtecon devis ricevi kaj serboj, kaj kroatoj, kaj slovenoj, kaj makedonoj, kaj montenegranoj, sed ankaŭ al la ceteraj etnaj minoritatoj oni garantiis „ĉiujn naciajn rajtojn“. Por la lingvo-politiko tio signifis, ke Tito rompis kun la unitarismo²⁴ de la antaŭmilita Jugoslavio, kondamnante la praktikon de Pavelić kiel eraran vojon. Dum la slovenaj lingvopolitikistoj tiris la konsekvencojn el la spertoj de la reĝlando, insistante pri ekzisto ekster la serbkroatisma, en Kroatio kaj Serbio la lingvodiskuto komenciĝis denove. De la politiko la kroata kaj serba estis konsiderataj kiel du apartaj lingvoj, kvankam ekzemple la partizanoj de ZAVNOH²⁵ opiniis, ke la serbkroata estas *unu* lingvo. Kiel nomo por tiu lingvo estis elektita „popola lingvo“ („narodni jezik“). La diskuto pri la ekava kaj ijekava variantoj, kiuj estis reduktitaj al nuraj regionismoj, transformiĝis al debato pri la lati-

¹⁶ Vd. <https://eo.wikipedia.org/wiki/Montenegro>.

¹⁷ Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Macedonia_\(region\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Macedonia_(region)).

¹⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Ante_Pavelić.

¹⁹ Sub la gvido Ustaŝo (1941 ĝis 1945) 330'000 ĝis 390'000 serboj fariĝis mortviktimoj de la genocido. La serboj, judoj kaj ciganoj estis liveritaj al la fifama koncentrejo en Jasenovac. La ekzakta nombro de viktimoj estas kontestata (vd. http://de.wikipedia.org/wiki/KZ_Jasenovac).

²⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Josip_Broz_Tito.

²¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Edvard_Kardelj.

²² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Milovan_Djilas.

²³ Kontraŭfaŝisma konsilio de la nacia liberigo de Jugoslavo (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Anti-Fascist_Council_for_the_National_Liberation_of_Yugoslavia kaj <https://de.wikipedia.org/wiki/AVNOJ-Beschlüsse>)

²⁴ Kvankam laŭ PIV temas pri religia termino, ĝi havas ankaŭ politikan signifon kaj signifas unuecan ŝtaton.

²⁵ Kontraŭfaŝisma landa konsilio de la nacia liberigo de Kroatio (vd. https://en.wikipedia.org/wiki/State_Anti-fascist_Council_for_the_National_Liberation_of_Croatia).

na kaj cirila alfabeto, kies egalrajta uzado estis antaŭvidata. La tuto do restis migrado sur la kresto de monto. Plej konsekvence la principoj de la egalrajteco ŝajnis ankriĝi en Bosnio-Hercegovino, kie la serba kaj kroata lingvoj, la latina kaj cirila alfabeto estis permesataj kiel kunekzistantaj skribformoj.

La decidoj de Novi Sad (1954)

En la nova konstitucio, aprobita la 31an de januaro 1946, „Jugoslavia Federacia Popolrespubliko“, proklamiĝis la 29an de novembro 1945 kiel „komunumo de egalrajtaj popoloj“, baziĝanta sur la „principo de la aŭtonomeco“ kaj kun la celo „krei ĉiujn kondiĉojn por la venko de la nacia problemoj“. Ĉe la komunistoj la nacia demando interesis antaŭ ĉio la slovenon Edvard Kardelj²⁶ kaj la serbon Ivan Stambolić,²⁷ kiuj rilate tiun temon kontraŭdiris unu la alian kaj ne povis trovi interkonsenton. Laŭ Kardelj, la libera evoluo de la naciaj lingvoj kaj kulturoj kondiĉigas la ekzistadon de la jugoslaveco. Komence de la 60aj jaroj ankaŭ Tito laŭokaze traktis en iuj paroladoj la nacian demandon. Sed la partiaj gvidantoj ne tro atentis la lingvan demandon kaj lasis ĝian traktadon al la lingvistoj, filologoj kaj literaturistoj. Ĝenerale validaj gvidlinioj por la lingvistiko ne estis formulitaj flanke de la partio. En Kroatio, kie la partio same silentis pri la lingva demando, la lingvistoj okupiĝis unuavice pri dialektologio kaj etimologio, dum la temoj, kiuj estis tabuitaj en la ŝtato de Ante Pavelić ekzemple la malpermesata ortografio „Londonac“,²⁸ ne estis tuŝata. La oficiala nomo de la lingvo estis en Kroatio „kroata lingvo“ (hrvatski jezik) aŭ „kroata aŭ serba lingvo“ (hrvatski ili srpski jezik) kaj „kroatserba lingvo“ (hrvatskosrpski jezik). En Belgrado, kie la ideo pri la unueco havis prioritaton, la gvida serba filologo de la intermilita Jugoslavio Aleksandar Belić,²⁹ kiu pli frue ankoraŭ parolis pri „nia skriblingvo“ k.s., adoptis nun la rolon de ‚partizano‘ de la serbkroata lingvo, ĉar li vidis la ĝustecon kaj pravecon de la historia verko de Vuk Karadžić³⁰ konfirmita, eldonante en 1950 „Ortografion de la serbkroata skriblingvo“, kvankam ankoraŭ en 1945 tie aperis „Gramatiko de la serba lingvo“. Baldaŭ montriĝis, ke en Serbio venkis la termino serbkroata (srpskohrvatski). En eldonaĵo (*Letopis*) de Matica srpska³¹ oni proponis en septembro 1953, ke la kroatoj rezignu pri la ijekava prononco kaj adoptu la ekavan prononcon, kiu validis en Serbio. Kvazaŭ rekompence, la serboj montris pretecon rezigni pri la cirila alfabeto favore al la latina. Miloš Moskovljević,³² slavisto kaj membro de la Serba Akademio de Sciencoj kaj Artoj, trafe resumis la lingvistikan situacion en Jugoslavio jene: „Ni liveras unikan ekzemplon en la tuta mondo. Jen ni estas popolo kun fremda nomo (iliroj), jen jugoslavo kaj jen tri diversaj popoloj: serboj, kroatoj, makedonoj [sic]³³ ... kun tri (iuj asertas kvar) skriblingvoj, kun du alfabetoj kaj kvin ortografioj kaj du terminologioj. Krom tio, tiu komuna lingvo ĉe ne havas komune adoptitan nomon, sed estas nomata laŭ dek diversaj variantoj: serba, kroata, serba aŭ kroata, kroata aŭ serba, serba (kroata), kroata (serba), serb-kroata, kroat-serba, serbkroata, kroatserba.“ Kaj li postulis „fini tiun malordon definitive“. Dum iuj serboj senskrupule defendis la ekavan kiel normon po la tuta serbkroata lingvokomunumo, ekzemple Josip Hamm,³⁴ lingvisto en Zagrebo, deziris konservi ambaŭ prononcojn.

Ĉi tiu tuta antaŭa diskuto en *Letopis* de Matica srpska kulminis en la konferenco kaj la decidoj de Novi Sad, kiu okazis en decembro 1954 kaj vekis grandan atenton. Ne politikistoj, sed 25 verkistoj kaj lingvistoj (precipe universitataj profesoroj) el Belgrado, Novi Sad, Zagrebo kaj Sarajevo kunvenis en la ĉefurbo de Vojvodino por trovi akcepteblan interkonsenton pri la temo de la komuna lingvo. Fakte oni atendis multon de tiu konferenco, sed la diferencoj inter kroatoj kaj serboj, kiuj malfidis unu la aliajn kaj ne rezignis pri naciismaj subtonoj, ne fariĝis pli malgrandaj en iliaj diskutoj.

²⁶ Vd. supre.

²⁷ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Ivan_Stambolić.

²⁸ Vd. <http://hr.wikipedia.org/wiki/Londonac>.

²⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Aleksandar_Belić.

³⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Vuk_Karadžić.

³¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Matica_srpska.

³² Vd. https://sr.wikipedia.org/wiki/Милош_Московљевић.

³³ Antaŭ 1944 la serba registaro konsideris la makedonajn partojn de la serba nacio („sudaj serboj“). En 1945 la jugoslaviaj komunistoj proklamis la slavan makedonan lingvon oficiala lingvo de Makedona Socialisma Respubliko kadre de Jugoslavio, dum la bulgaroj konsideris ĝin bulgara dialekto. (Vd. [https://de.wikipedia.org/wiki/Mazedonier_\(moderne_Ethnie\)](https://de.wikipedia.org/wiki/Mazedonier_(moderne_Ethnie)), https://de.wikipedia.org/wiki/Mazedonische_Sprache). Cetere, ĝis hodiaŭ en Greklando la slavaj makedonoj ne estas agnoskitaj kiel etna minoritato kaj Atento volas ankaŭ eviti, ke la iama jugoslavia makedona respubliko oficiale nomiĝu Makedonio.

³⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Josip_Hamm.

Mal-graŭ tio oni sukcesis kompili rezolucion, kiu ignoris la kontraŭdirojn kaj tendencis al kompromiso. Tiel, la terminoj serbkroata kaj kroatserba estis alterne uzataj kaj difinitaj kiel komuna „popollingvo de serboj, kroatoj kaj montenegranoj“. La uzado de ambaŭ alfabetoj, latina kaj cirila, kaj ambaŭ prononcoj, ekava kaj ijekava, estis permesataj kiel egalrajtaj formoj. La subskribintoj de la rezolucio ankaŭ estis konvinkitaj, ke komuna lingvo devas disponi pri komuna ortografio. Oni opiniis, ke la ellaborado de tia ortografio estas la plej urĝa kultura kaj socia tasko de la aktuala tempo, dum la adopto de artefaritaj obstakloj por la natura kaj normala evoluo de tiu skriblingvo estas evitenda. La nedevigaj decidoj de la konferenco estis redaktitaj en latina skribo kaj ekava prononco kaj eldonitaj de Matica srpska, la iniciatinto de la konferenco, kaj porinforme senditaj al la universitatoj en Belgrado, Zagrebo kaj Sarajevo, al la akademioj de scienco en Zagrebo kaj Belgrado kaj al la ekzekutivaj konsilioj de la poplorespublikoj de Serbio, Kroatio, Bosnio-Hercegovino kaj Montenegro kaj al la Matica hrvatska³⁵ kaj publikigitaj en la gazetaro.

La teorio de la variantoj de Dalibor Brozović

En 1960 Matica srpska kaj Matica hrvatska publikigis komunan ortografion, kiu aperis en versioj serbkroata cirila/ekava (Novi Sad) kaj kroatserba, latina/ijekava (ambaŭ estis preskaŭ identaj). En la konstitucio de la kroata respubliko de 1963 estis fiksita la „kroatserba“ kiel oficiala lingvo, dum la konstitucioj de Serbio, Bosnio-Hercegovino kaj Montenegro preferis ĉe la sama loko la terminon „serbkroata“.

Sed ankaŭ post la historia kaj sukcesa konferenco de Novi Sad la diskuto ankoraŭ longe ne estis finita. En 1963, kiam en la konstitucio, artikolo 42, estis fiksita la egalrajteco de la lingvoj kaj nacioj de Jugoslavio kaj de ties alfabetoj, inter kelkaj envolvitaj kolegoj eksplodis nova kverelo pri la „vera“ senco de tiuj decidoj. Tiel, ekzemple la kroato Ljudevit Jonke³⁶ opiniis, ke „la fakto, ke la ĉe la popolaj lingvoj de la serboj kaj kroatoj estas ekzistas unueco, ne signifas la konkludon, ke la serba kaj kroata ortografioj kaj skriblingvoj devas esti identaj“. Krom tio temis pri la demando, ĉu estas akceptebla, se ekzemple montenegrano (kiel Mihailo Stevanović³⁷) kiel ijekavano adaptiĝas al sia libervole elektita belgrada patrujo kaj parolas ekave en la publikeco. Tio estis, laŭ Jonke, problemo de la kredindeco. Plue Jonke, kiu apartenis al la komisiono, kiu formulis la decidojn de la konferenco de Novi Sad, argumentis, ke ĉiu jugoslavia popolo havas la nerefuteblan rajton evolui laŭ propra nacia kulturo en la socialisma senco kaj en la spirito de la ideo de la „frateco kaj unueco“ de la jugoslavaj popoloj“. Sed laŭ li tio ankaŭ signifis, ke „ĉiu jugoslavia popolo rajtas havi propran nacian lingvon kaj propran ortografion“.

La debato, kiu ŝajnis troviĝi en la sakstrato, komplikiĝis per la kontribuo de Dalibor Brozović,³⁸ alia kariera kroata lingvisto (kiu estis ankaŭ esperantisto), kiu prezentis novajn sensaciajn diferencigojn, enkondukante kiel novajn aspektojn „variantojn“ kaj la „diasistemon“. En tio li analoge komparis la situacion de la serbkroata aŭ kroatserba lingvo kun la situacio de la pola kaj kaŝuba, supra kaj malsura soraba, rumana kaj moldava lingvoj. Lia termino de la variantoj fariĝis la bazo por la postulo de kelkaj kroataj lingvistoj konsideri kaj normigi la kroatian variecon aparte de la serba varieco. Samtempe, en iu teksto de 1957 Brozović ekskludis ĉiun dubon, ke la „kroatserba lingvoregiono“ baziĝas sur la „sama fonologia + sama morfologio + sama sintakso + sama baza vortaro“. Sed „diferenci“ povas „en la lingvistike vidate sama lingvo“ nelingvistikaj „kategorioj“ kiel „la ortografio, ortoepiko, terminologio kaj vortaro“. Ĉi tiuj kategorioj formis por Brozović la „superstrukturon“. Dum la 5a kongreso de jugoslavaj slavistoj, kiu okazis en septembro 1965 en Sarajevo, kaj en diversaj aliaj kontraŭdiraj debatoj, la kverelo pri la variantoj estis ĝissate diskutata kaj komplete kondukita al la absurdo.

³⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Matica_hrvatska.

³⁶ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Ljudevit_Jonke.

³⁷ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Mihailo_Stevanović.

³⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Dalibor_Brozović, <https://hrcak.srce.hr/file/67840>, <https://www.vecernji.hr/enciklopedija/dalibor-brozovic-18127>.

Ŝanĝo de la paradigmo post 1965 kaj la sekvoj de la lingvistika diskuto

En la dua duono de la 1960aj jaroj la sinteno de la jugoslaviaj komunistoj ŝanĝiĝis rilate la nacian demandon en kvazaŭ sensacia kaj fatala maniero. La elirpunkton por tiu ŝanĝo de la paradigmo formis la 8a kongreso de la Ligo de la Jugoslaviaj Komunistoj (1964), kiu prezentis iun bilancon de la ĝisnuna nacia politiko. En aprilo 1966 la membroj de iu komisiono de la Ligo konstatis, ke la ĝis nun faritaj eldiroj de la partio pri la nacia demando enhavis „grandajn kontraŭdirojn“. Oni konfesis, ke oni forte neglektis la temon kaj kredis, ke ĝi estas solvita. Samtempe oni sentis sin nekapabla klare vidi la kaŭzojn de la eraroj de la ĝisnuna politika kurso. Ekzemple la serba politikisto Koča Jončić opiniis, ke la jugoslava nacio estas kontraŭdiro en si mem, tiel ke li konsideris la kreon de tia nacio simple malebla. Ĉar la postulo de la kreo de unueca jugoslava nacio estigus la problemon de la kreo de unueca skriblingvo. Krom tio ekzistis la danĝero, ke per la elformiĝo de jugoslava nacio oni malavantaĝigus neslavajn etnojn kaj naciecojn de Jugoslavio. Kardelj kompletigis siajn pli fruajn konsiderojn per tio, ke li pritaksis la nacion kiel „grandan progreson de la laborista klaso“. La komunistoj estis alvokataj subteni la naciojn kaj naciecojn kaj ne malhelpi ilin dum la evoluado de iliaj skriblingvoj kaj kulturoj. Ĉi tiuj nekutimaj vortoj kaj frazoj, kiuj estis nepenseblaj antaŭ kelkaj jaroj, plene renversis la ĝis nun validajn konvinkojn kaj ne restis sen reagoj. Precipe la serboj, inter kiu la ideo de la unueco ŝajnis fariĝi firma dogmo, la mirado estis granda. Ĉefe en rondoj de pli malaltrangaj komunistoj, kiuj estis surprizitaj de la novaj opinioj, ili estis konsiderataj kiel fremdaj kaj altruditaj. Dum ekzemple la verkisto Dobrica Ĉosić³⁹ kondamnis ilin kiel „burokratecan naciismon“ kaj „partikularan orientiĝon“ de „etburĝaj fortoj“, kolegoj en la Ligo de Serbiaj Komunistoj rifuzis lian opinion. Veljko Rus,⁴⁰ slovena sociologo, ĵetis aldonan oleon en la fajron, neante la ekziston de komuna „jugoslavia merkato“, kaj antaŭvide diagnozis „politikan malintegriĝon“ de la federacia ŝtato. La diskuto pri la karaktero kaj enhavo de la jugoslaveco do ree plene ekbolis. En 1966 iuj partiaj teoriuloj rekomendis, ke oni ne tro vidu en la „jugoslaveco etnan kategorion“. Kiu ekzemple havis kroatan patron kaj serban patrinon, tiu troviĝis en dilemo, kiu estis publike diskutata en la belgrada gazeto *NIN*. La jugoslaveco estis pli kaj pli perceptata kiel „artefarita politika konstruaĵo“, eĉ kiel „instrumento de la diskreditado de la atingoj de la socialisma revolucio“. En la censo de la jaro 1971 fakte nur 1,3 procentoj de la popolo indikis, ke ili estas jugoslavo.

Proponoj de Slovenio ĝis la konstitucio de 1974

Tiu ŝanĝo de la paradigmo rilate la politikon de la nacia demando, kiu estis por la jugoslavo perpleksa kaj por homoj ekster Jugoslavio apenaŭ komprenebla afero, havis en Jugoslavio mem senperajn sekvojn por la sinteno rilate la lingvan demandon. Dobrivoje Radosavljević, prezidanto de la Centra Komitato de la Ligo de Serbiaj Komunistoj,⁴¹ donis al la ideo de la komuna jugoslava lingvo la mortbaton, kiam en februaro 1967 li skribis en la belgrada gazeto *Politika*, ke la ideo de komuna lingvo estas „ja bone intencita“ sed restas tamen nur „deziro“. En tiu momento ĝuste la slovenoj utiligis la unikan ŝanĉon agi kontraŭ la prema domineco de la serbkroata lingvo en la komuna ŝtato. Kvankam en popolenketo preskaŭ 57% de la slovenoj konsideris la rilatojn inter la nacioj kaj naciecoj „bonaj“, tamen preskaŭ 13% de la demanditoj pritaksis ilin „malbonaj“. Ĉi tiu negativa parto estis konsiderata kiel sufiĉe esenca kaj la sukceso de Kardelj en la diskuto pri nacia politiko sufiĉis por postuli la altigon de la statuso de la slovena lingvo en la praktiko kaj pravigi la batalon kontraŭ la superpezo kaj laŭdire damaĝa influo de la serbkroata en la slovena lingvo, precipe en la poŝta kaj dogana sektoroj, sed ankaŭ ĉe la fervojoj kaj en la armeo.

Por realisme dokumenti la statuson de la slovena lingvo, la slovena justicministerio kaj la registaro de Slovenio verkis raporton. En ĝi oni konstatis diversajn deficitajn malfavore al la slovena lingvo. Oni emfaze deziris, ke oni volas plibonigi la statuson de la slovena lingvo en Jugoslavio kaj reale efektiviĝi ĝin. Oni menciis la lingvan praktikon en Svislando kaj rekomendis, ke ankaŭ sur la federacia nivelo la dungitoj, kiuj apartenas al la aliaj popoloj de Jugoslavio, alproprigu almenaŭ bazajn konojn de la slovena lingvo. La studo el Ljubljana servis kiel modelo por konferenco, kiu estis organizita en junio 1968 de la Socialisma Unuiĝo de la laboranta popolo de Jugoslavio, kies tasko estis mediti pri la egalrajteco de la lingvoj de la jugoslaviaj nacioj en la federaciaj organoj. Dum la repre-

³⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Dobrica_Ĉosić.

⁴⁰ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Veljko_Rus.

⁴¹ Vd. https://sl.wikipedia.org/wiki/Dobrivoje_Radosavljević.

zentantoj de aliaj respublikoj kiel ekzemple Miloš Radević, juĝisto en la Supera Tribunalo de Jugoslavio, kiu estis montenegrano, principe bonvenigis la slovenajn postulojn, precipe la serba flanko, konkrete Svetozar Marković, profesoro en Sarajevo,⁴² kontraŭstaris ilin, ĉar li konsideris la slovenajn ambiciojn troigitaj. Pavle Ivić,⁴³ posteulo de la forpasinta lingvista eminentulo Aleksandar Belić, eĉ aŭdacis rifuzi la slovenajn postulojn kiel „maljustajn“ kaj „nerealismajn“. Ĉar la partoprenantoj de la konferenco ne povis interkonsenti, la konsilio pri naciecoj de la federacia parlamenta deĉis okupiĝi pri la temo. Ĉi tiu konsilio estis fondita en 1945 kaj estis nun reaktivigita per modifoj en la konstitucio. Laborgrupo sub la gvido de Koča Jončić starigis „rezolucion por efektivigi la konstituciajn principojn rilate la egalrajtecon de la lingvoj kaj skriboj de la nacioj kaj naciecoj de Jugoslavio en federaciaj ordonoj kaj en la laboro de la federaciaj organoj“. En aprilo 1969 ĝi estis akceptita de la federacia parlamento kaj agnoskiĝis kiel oficiala platformo de la lingvopolitiko de Jugoslavio. En la kerno estis dirita nenio nova. La rezolucio konfirmis nur kelkajn mankojn ĉe la „realigo de la egalrajteco de la lingvoj“ kaj lamentis pri la „domineco de la serbkroata aŭ kroatserba lingvo en la laboro de la federaciaj organoj“, tiel ke la komunikado de la federaciaj organoj kun la aŭtoritatoj kaj civitanoj de la respublikoj okazas „grandparte en la serbkroata lingvo kaj latina skribo“, kio kondukis al la „artefarita generado de ŝtataj lingvoj kaj skribo“. En principo la rezolucio sekvis la proponojn el Slovenio sed rezignis pri konkretaj rimedoj por praktike plibonigi la situacion kaj sole atentigis pri la validaj konstituciaj reguloj. Ĝuste en la „internacia trafiko“ la principo de la egalrajteco de la lingvoj de la nacioj de Jugoslavio devintus esti aplikata, ekzemple ĉe internaciaj traktatoj, do en la diplomatio. Por la armeo Jaka Avšič, iama altranga soldato,⁴⁴ postulis principan reorganizado en la senco de likvido de la nacie miksatataj taĉmentoj kaj kunigo de la soldatoj de sama nacieco laŭ unuoj kun gepatralingva komandlingvo. Sed la ministerio de la defendo de Jugoslavio ne estis interesata pri tia propono kaj insistis pri la serbkroata lingvo kiel sola komandlingvo de la jugoslavia armeo.⁴⁵ Samtempe, ĝi montris sin preta permesi la ekzercadon de la soldatoj ankaŭ en aliaj lingvoj. Fakte, la minoritataj lingvoj ricevis pli altnivelan statuson (ankaŭ en la armeo) per la nova konstitucio de 1974, kiu baziĝis sur la principa egalrajteco de la jugoslaviaj lingvoj sendepende de ilia signifo. Tio precipe koncernis ankaŭ la idiomojn de la „naciecoj“ (narodnosti), nome la albanan, hungaran, italan k.a. La du unuaj eĉ estis agnoskitaj kiel oficialaj lingvoj en Jugoslavio. Al la etnaj minoritatoj oni cedis la rajton komunikiĝi kun la reprezentantoj de la ŝtataj instancoj en la propra gepatra lingvo.

La kroata „lingva deklaro“ de 1967 kaj la sufokado de la „Kroata printempo“ (1971)

En la venonta akto de la ŝajne komplete bizara jugoslavia lingva teatro la kroatoj elpaŝis per deciditaj kaj provokaj pozicioj sur la koncerna scenejo, kun fatalaj sekvoj.

La teorioj pri la variantoj de Dalibor Brozović, kiu analoge komparis la serban kaj kroatan variantojn kun la angla kaj usona variantoj de la sama skriblingvo, kaŭzis ĉe la filologia eminentularo de Serbio kaj Montenegro malplaĉon. Kaj je la flanko de la kroata kulturelito restis la malkontenteco pri la statuso de la kroata varieco kaj pri la traktado de la kroata nomo fare de la serbaj filologoj. Tial, la kroatoj nun strebis mem solvi la problemon laŭ propra maniero. En marto 1967 ili publikigis en zagreba gazeto „deklaracion pri la nomado kaj situacio de la kroata skriblingvo“⁴⁶, kiu estis subskribita de 18 signifaj sciencaj kaj kulturaj institucioj de Kroatio. La publikaĵo kaŭzis tiel altajn ondojn, ĉar en la deklaraĵo oni ne nur asertis, ke „ĉiu popolo havas la rajton nomi sian lingvon per propra nomo“, sed ankaŭ postulis, ke en la jugoslavia konstitucio la nomoj de la slovena, kroata, serba kaj makedona skriblingvoj estu aparte menciitaj. Post du tagoj Serbio reagis – per surprizo. 48 serbaj verkistoj prezentis siaflanke „proponon por meditado“. En principo ili konfirmis la kroatajn ideojn kaj esprimis sian certecon, ke „la kroata kaj serba lingvoj evoluos en plenaj memstareco kaj egalrajteco“. Malpli da entuziasmo la kroata deklaraĵo tamen vekis en la medioj de la komunisma partio, kiu sentis sin totale surprizita de ĝia publikigo. Aperis protestoj kaj kontraŭstaro eĉ en la gazetaro. Ankoraŭ en la sama monato la CK de la Ligo de Kroataj Komunistoj komunikis, ke la deklaraĵo estas neakceptebla por ĝi. La dokumento estis kondamnita kiel „kruda misuzo de la demokratiaj aŭtonomiaj rajtoj“ kaj kiel lezo

⁴² Vd. [https://bs.wikipedia.org/wiki/Svetozar_Marković_\(lingvist\)](https://bs.wikipedia.org/wiki/Svetozar_Marković_(lingvist)).

⁴³ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Pavle_Ivić.

⁴⁴ Vd. https://sl.wikipedia.org/wiki/Jaka_Avšič.

⁴⁵ La plimulto de oficiroj de la jugoslavia armeo estis serboj.

⁴⁶ La originalan tekston vd.

https://en.wikipedia.org/wiki/Declaration_on_the_Status_and_Name_of_the_Croatian_Literary_Language.

de la principo de la „frateco kaj unueco“. En la kroata parlamento oni eĉ parolis pri „politika deflan-kiĝo“ kontraŭ la socialismo. Tito vidis kialon por persone enmiksiĝi por plendi pri la „filozofiumado“ de kelkaj „intelektuloj“ pri „gramatiko“, „dialektoj“ kaj „diferencoj inter la nacioj“, por malkvalifiki la tuton kiel „malbonon“ kaj konsideri la „deklaraĵon“ kiel perfidan atakon kontraŭ la jugoslavia unueco. La plej freŝan elpaŝon de la kroatoj li komparis eĉ kun la politiko de la Ustaŝo,⁴⁷ dum la serbojn de Kroatio li protektis. La opinio de Tito pri tiu lingva kverelo ne restis sen sekvoj. Kaj la kroata „deklaraĵo“ kaj la serba „propono“ estis kvalifikitaj kiel „naciismaj-ŝovinismaj atakoj“ kaj la iniciatintoj estis punitaj de la partio. Vladimir Bakarić, la ĉefo de la kroata KP,⁴⁸ ŝajne komprenis, ke la kroata „deklaraĵo“, kiun la aŭtoroj cetere tute ne verkis kun la intenco opozicii al la ŝtata partio, ĝuis simpatian en la popolo kaj sendube havis influon al la reformmovado, kiu furoris en tiu tempo en Kroatio. La konsultiĝoj inter reformemaj politikistoj, elitoj de la kultura vivo kaj diversaj fakuloj estis daŭrigataj. Same kaj sur kroata kaj sur serba flankoj ankaŭ la ŝajne etmensa lingva milito sur la nivelo de vortaroj kaj lernolibroj estis daŭrigata. Kiam Matica hrvatska proklamis en aprilo 1971 la decidojn de Novi Sad de la jaro 1954 „nulaj kaj senvalidaj“, estis atingita nova kulmino de la konflikto, des pli ke inter la serboj, por kiuj la decidoj de Novi Sad pri la unueco de la lingvo daŭre validis. Fakte ekzistis neniuj, kiu kapablis imagi memstaran kroatan lingvon. Samtempe, la disputo pri la lingvo de la serboj kaj kroatoj estis akompanata de kontraŭdira diskuto pri la historio de la kroata skriblingvo. En tiu debato la kroatoj klopodis meti la komencojn de memstara kroata skriblingvo kiel eble plej frue, do minimume al la 17a aŭ 18a jarcento. En sia studo de 1970 pri la normita lingvo Brozović klarigis, ke la serb-kroata lingvo signifas por li specialan fenomenon ene de la slava lingvaro, ĉar temas pri instrumento de du nacioj, tial ke li lasis neniun dubon, ke li preferus havi propran kroatan normlingvon.⁴⁹ En siaj 10 hipotezoj (aŭ ŝlosilaj demandoj) pri la kroata skrib-lingvo de 1971 Brozović eĉ ŝovis la komencon de la kroata skriblingvo al la mezepoko de la eklezislava lingvo kaj Glagolico.⁵⁰ Kelkaj kroatoj rimarkigis, ke ili konsideras la adopton de la ŝtokava malfavore al la kajkava kaj ekava altrudita al la kroatoj. Ligita kun tiu diskuto estis la demando, ĉu la serboj en Kroatio, kiuj formis 12 procentojn de la loĝantaro kaj vivis precipe en la tiel nomata Kraj-no,⁵¹ utiligas propran lingvon kaj ĉu la dalmata urbo Dubrovnik apartenas al la ŝtokava (serba) aŭ ĉa-kava (kroata) zono.

Ne sen la partopreno de Tito, kiu ŝanĝis sian opinion pri Kroatio, la kroata reformprintempo estis sufokita kaj disbatita en decembro 1971: La reformistoj de la kroata partia pinto estis sen-potencigitaj, la gvidantoj de la studenta movado kaj sennombraj protagonistoj de la kroatismo estis arestitaj (ĉirkaŭ 32'000 personoj tiam estis jure persekutataj). Kroataj filologoj devis elteni ĉikanojn kaj reprezaliojn, kaj la „naciistoj“ inter la ĝisnunaj lingvopolitikistoj estis silentigitaj. La „idea preci-zigo“ en la kultur- kaj lingvopolitiko de Tito estis eĉ pravigita de la sloveno Stane Dolanc, ano de la prezidio de la Ligo de Jugoslaviaj Komunistoj, kiu estis kontraŭulo de liberalismaj kaj naciismaj strebadoj.⁵² La lingvoj de la serboj en Kroatio kaj precipe la „kroata ortografio“ estis malpermesitaj kaj tabuitaj.⁵³ Malgraŭ tio, la amendoj al la „kroata skriblingvo“, kiuj estis publikigitaj en marto 1972, estis akceptitaj de la konstitucio de 1974 (art. 138) kiel „normoj de la popollingvo de la kroatoj kaj serboj en Kroatio, kiujn oni nomas kroata aŭ serba“. Artikolo 1a postulis Kroation kiel „nacion ŝtaton de la kroata popolo, ŝtaton de la serba popolo en Kroatio kaj ŝtaton de la naciecoj, kiuj vivas en ĝi“. Ŝajnis, ke en la politika batalo unuflanke venkis la titoistoj kaj unuecaj jugoslavo por certigi la principon de la „frateco kaj unueco“. Aliflanke kaj almenaŭ sur la nivelo de la konstitucio la naciismaj kroatoj povis puŝi siajn formalajn imagojn, kio signifas specon de jugoslavia kompromiso. Sed ĉar ili estis nur formalaj, la kernaj kontraŭdiroj ne povis esti definitive solvitaj, kiel montros la sekvo de la historio.

⁴⁷ Vd. [https://en.wikipedia.org/wiki/Black_League_\(Ustaše_militia\)](https://en.wikipedia.org/wiki/Black_League_(Ustaše_militia)).

⁴⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Vladimir_Bakarić.

⁴⁹ Vd. <https://d-nb.info/1156901294/34>, p. 2.

⁵⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Malnovslava_lingvo kaj <https://eo.wikipedia.org/wiki/Glagolico>.

⁵¹ En 1971 estis nombritaj 626'789 serboj en la Kroata Socialisma Respubliko (t.e. pli ol 14% de la tuta loĝantaro de Kroatio). En 1991 vivis 12,1% (581'633) serboj en Kroatio (vd. <http://www.rastko.rs/istorija/srbi-balkan/jilic-croatia.html>), sed nur 1,24% (97'344) kroatoj en Serbio (laŭ la censo de 1961 estis ankoraŭ 196'409 kroatoj). Post la milito en Kroatio en 2001 restis en la etne purigita Kroatia Respubliko ankoraŭ 202'000 serboj (4,5%).

⁵² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Stane_Dolanc.

⁵³ Tiu ortografio tamen restis konservata kiel „londona“ ortografio (vd. <http://hr.wikipedia.org/wiki/Londonac>).

Polemiko en Bosnio-Hercegovino, la muzulmanoj kaj la principo de la toleremo

Ankaŭ la CK de la Ligo de Komunistoj de Bosnio-Hercegovino rifuzis la kroatan „deklaraĵon“ kiel „daŭrigon de hegemoniaj aspiroj“ rilate al ilia respubliko. Ĉi tie ekzistis kverelo pri la ideo de muzulmana varianta de la serbkroata lingvo kaj pri tio, ĉu la muzulmanoj estu agnoskitaj kiel propra nacio (kio fakte okazis en 1971). Unuopaj fanatikuloj polarigis la debaton per malbela polemiko kaj reciprokaj akuzoj, kiu okazis inter radikaluloj kiel Muhamed Filipović, fakulo pri marksisma filozofio,⁵⁴ kaj Jovan Vuković, denaska montenegrano (sed ekav-lingva), kiu elpaŝis kiel ĉefideologo de la serbkroatismo en Sarajevo kaj kiel senkompromisa kontraŭulo de la teorio de la variantoj de Brozović.⁵⁵ Homoj, kiuj havis alian opinion, estis denuncitaj de li kiel naciismaj romantikuloj kaj malsciencagantaj separatistoj kaj akuzitaj pro lezado de la socialisma ordo, kiu estis kutima riproĉo por diskrediti kontraŭulojn.

Kiam en aprilo 1970 en Sarajevo okazis pritema simpozio, oni rifuzis bosnan-hercegovinan lingvan varianton (laŭ la teorio de Brozović). Anstataŭ tio oni preferis kaj emfazis la ideon de la toleremo rilate al la popoloj, lingvoj, lingvaj formoj kaj alfabetoj. La legendea ideo de la bosnia toleremo estis proklamita ne nur kiel dogmo, sed en kaj ekster Bosnio ankaŭ glorata kiel mito (kiu en la 90aj jaroj jam ne plu helpis eviti la sangajn militojn, la etnajn purigojn kaj la genacidon kontraŭ la muzulmanoj). En Bosnio oni timis, ke la polarigo laŭ la teorio de la variantoj povus konduki al malintegriĝo de la bosna-hercegovina kulturo. La decidoj de la konferenco fiksas, ke ĉio, kio ekzistas laŭ la serbkroata normo, validas ankaŭ en Bosnio sendepende de la deveno de la parolantoj. Kiel oficiala nomo de la lingvo estis ordonita la terminoj „serbkroata“ kaj „kroatserba“, dum la latina kaj cirila alfabetoj estis proklamitaj kiel egalrajtaj. Tiel oni decidis por la absoluta libereco de la individua lingvouzo kiel ankaŭ por la tolerado de ĉiuj eksteraj influoj. Kiam dum iu konsultiĝo, okazinta en oktobro 1973 en Mostar, 300 lingvistoj, instruistoj kaj politikistoj diskutis pri la efektiviĝo de la decidoj de la simpozio pri toleremo de Sarajevo, elpaŝis diversaj parolantoj kiel Milan Šipka, kiu insiste pledis por la toleremo,⁵⁶ aŭ kiel Ivan Lovrenović, kiu konstatis „drastan abismon“ inter la teorio kaj praktiko de la lingvopolitiko de Bosnio-Hercegovino.⁵⁷ Debato pri la praktika realigo de la decidoj de Sarajevo apenaŭ okazis. Aliflanke oni pompe anoncis, ke oni faros „sisteman kaj intensan sciencan esplorkonon“ vide al la „kompleksa lingva politiko“ en Bosnio-Hercegovino. En la konstitucio de 1974 oni fiksas por Bosnio-Hercegovino la oficialan uzon de la serbkroata aŭ kroatserba lingvo kun ijekava (!) prononco kaj proklamis ambaŭ skribojn egalrajtaj, kvankam en la serbaj regionoj de Bosnio-Hercegovino uziĝis la ekava prononco.

Dilemo kaj skismemo en Montenegro

Diference de la bosniaj muzulmanoj, kies vojo de la nacia formiĝo estis senkompare pli longa kaj komplika ol ĉe la aliaj etnoj de Jugoslavio, la montenegranoj estis senprokraste agnoskitaj kiel nacio (narod) en la postmilita konstitucio de Jugoslavio. Malgraŭ tio, en tiu fora kaj iom flanke situanta montara lando inter Serbio, Bosnio-Hercegovino kaj Albanio, kiu sendube montris proprajn regionajn trajtojn de la historio kaj kulturo, oni estis tre malcerta, ĉu la montenegranoj formas integran parton de la serba popolo aŭ ĉu ili estas memstara ento kun aparta etna, kultura kaj lingva identeco. Brozović ne konsideris la montenegranojn „plene elformiĝinta nacio“ (1967) kaj parolis en la kazo de la ijekava lingvo de Montenegro pri „subvariante“ (1970), sed li ne volis ekskludi, ke eventuale ekzistas ankaŭ montenegra varianta (1971). En 1971 li konfesis memkritike, ke li „subtaksis la malfacilan gradon de la montenegra lingvoproblemo“. Ĉar en tiu tempo en Titograd (Podgorica) ankoraŭ ne ekzistis propraj sciencaj (aŭ akademaj) institucioj, Montenegro aspektis en lingvistika kaj lingvopolitika rilatoj kiel dezerto. Sed tio ne signifis, ke inter kelkaj lokaj intelektuloj ne okazis kon-traŭdiraj diskutoj. Komence de la 70j jaroj tia disputo eĉ kulminis en la senco de skismo en la elito laŭ du tendaroj. Dum la Asocio de la instruistoj de la serbkroata lingvo senkondiĉe konsideris la decidojn de Novi Sad (1954) kiel validajn principojn de la lingvopolitiko, la Verkista Asocio de Montenegro – ekzistis nur tiuj du organizaĵoj sur tiu kampo – ne agnoskis ilin, ĉar la verkistoj de Montenegro rifuzis akcepti importitan skriblingvon el Belgrado aŭ Zagrebo. Tiel, ili kontraŭstaris ĉiujn

⁵⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Muhamed_Filipović.

⁵⁵ Vd. https://bs.wikipedia.org/wiki/Jovan_Vuković.

⁵⁶ Vd. https://de.wikipedia.org/wiki/Milan_Šipka.

⁵⁷ Vd. https://hr.wikipedia.org/wiki/Ivan_Lovrenović.

provojn kaj klopodojn de ekstere nei la montenegrajn literaturon kaj nacion kaj utiligis la referencadon al lokaj verkistoj kiel Petar Petrović Njegoš, Stjepan Mitrov Ljubiša kaj Marko Miljanov Popović,⁵⁸ kiuj „parolis en propra lingvo“ aŭ eĉ utiligis „nian lingvan varianton“. Dum la instruista asocio parolis per unu voĉo, la verkistoj ne restis unuanimaj inter si. La partiaj gvidantoj de Montenegro pledis por la „lingva komunumo kun aliaj nacioj kaj respublikoj kun serbkroata lingvo“. Ili fiksas tiun intencon en la konstitucio de sia respubliko, proklamante la lingvojn kaj skribojn de la nacioj kaj naciecoj de Jugoslavio egalrajtaj kaj decidis, ke por la oficiala uzo servu en Montenegro la serbkroata lingvo kun ijekava prononco. Kiel malfacile estis solvi la montenegran dilemon, montris emocia diskuto pri la artikolo pri la lingvo de Montenegro en la „Jugoslavia enciklopedio“ de 1984, kies teksto estis jena: „La lingvo de la montenegra popolo estas la serbkroata, ĝiaj dialektoj apartenas al la ŝtokava dialekto kun ijekava prononco. La serbkroata estas la lingvo de kroatoj, muzulmanoj kaj serboj.“ Laŭ tiu difino ekzistis montenegra popolo sed ne montenegra lingvo. En aldono oni povis legi jenan diferencigon, laŭ kiu „aliflanke multaj montenegranoj, kiuj vivas ekster Montenegro, uzas ankaŭ la ekavan skriblingvon. En la ĉiutaga vivo la montenegranoj tradicie nomis sian lingvon, ankaŭ en la tempo de la memstara montenegra ŝtato (ĝis 1918), serba.“

Batalo kontraŭ la kroata lingva separatismo

Post 1974 okazis ankoraŭ aliaj groteskaj skandaletoj, kiuj plue vivigis la konfuzitan diskuton pri la serbkroata lingvo. Post kiam Brozović & ko. insistis pri la teorio de la variantoj, en Kroatio oni klopodis daŭrigi la rekonstruadon de memstara normado de la (kroata) lingvo kune kun ĝia historio. Brozović nomis la serbkroatan lingvon de la kroatoj, bosniaj-hercegovinaj muzulmanoj, montenegranoj kaj serboj nun „laŭnorma nova ŝtokava“, dum la „komunan ĝeneralan modelon de la serbkroata lingvo“ li konsideris „abstraktaĵo“. Kiam en 1979 iu kroata lektoro anstataŭigis en la oficiala bulteno de SFRJ iujn vortojn per kroataj formoj, ekestis konsterno, kiu sekvigis la suspendon de la koncernata lektoro de la tasko. Samtempe, Stipe Šušteršič, gvida partia ideologo de Kroatio kaj Jugoslavio de post 1971,⁵⁹ rifuzis permesi lernolibron sub la titolo „Gramatiko de la kroata skriblingvo“, ĉar laŭ lia opinio la titolo devis esti „kroata aŭ serba lingvo“, kiel li instruis la aŭtorojn. Sed tiuj rifuzis la kritikon per la argumento, ke ili ricevis la taskon ellabori gramatikon de la laŭnorma lingvo kiel ĝi estas uzata en Kroatio kaj kiel ĝi estis postulata de la kroatia konstitucio kiel „kroata skriblingvo“. Šušteršič repafis per akra retoriko kaj nomis la kroatajn lingvistojn politike danĝeraj, avertante pri la kroata lingva naciismo, kiu estas kiel „opio“ por certa parto de la popolo kaj parolis pri la „manio de la lingva purismo“ kaj pri „perforto kontraŭ la lingvo“. Iu eseo de Brozović pri la kroata lingvo estis kondamnita kiel „strategia instruaĵo“ por kroataj naciistoj, kaj liaj intencoj estis taksitaj kiel provo prepari Kroation por la tempo post Tito. Dum kunveno de la prezidio de la CK de la Ligo de Kroataj Komunistoj Šušteršič eĉ ne hezitis postuli „ekstermi“ la „farojn“ de tiuj homoj, kiuj havas la celon „altrudi la (kroatan) lingvopurismon“. Kaj Božidar Pasarić, gvidanto de la lerneja kontrol-aŭtoritato de Rijeka, anoncis, ke li intencas peti la konstitucian tribunalon ekzameni, ĉu la lingva difino en la kroatia konstitucio kongruas kun la cetera kroatia kaj jugoslavia konstitucioj. En printempo 1986 sekvis laŭ iniciato de la CK de la Ligo de Kroataj Komunistoj kunsido, en kiu kolektiĝis membroj de la CK-j de la Ligoj de Komunistoj de ĉiuj kvar serbkroataj respublikoj por diskuti pri aktualaj lingvopolitikaj problemoj. En iu „Zagreba interkonsento“ la partoprenantoj konfesis gravajn erarojn, kiuj estas klarigeblaj pro la manko de unueca fundamento de la lingvopolitiko en la serbkroata lingvospaco. Anstataŭ la „lingva separatismo“ oni emfazis la „lingvaj komunecojn“ kun la postulo finfine komenci la normadon de la serbkroata lingvo. Sed la decidoj restis pendantaj en la aero sen voĉdono, tiel ke nova ŝanco reguligi la aferon estis glate maltrafita.

Ĉiuj kontraŭ ĉiuj

Fine de la 70aj jaroj, en Serbio la politika engaĝiĝo por la lingvo formiĝis ankoraŭ iom pli harmonie. Sed ankaŭ ĉi tie la gvidaj lingvistoj, precipe Slavko Vukmanović, ĵetis oleon en la fajron, liberigante sin de la decidoj de Novi Sad de la jaro 1954, kiujn ili nomis „iluzio, romantika vizio, kiu estas

⁵⁸ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Petar_II_Petrović_Njegoš, https://en.wikipedia.org/wiki/Stjepan_Mitrov_Ljubiša, https://en.wikipedia.org/wiki/Marko_Miljanov.

⁵⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Stipe_Šušteršič.

malproksima de la vivo kaj de la lingva realeco“. Samtempe oni postulis ankaŭ „lingvan toleremon“, „rifuzon de ĉiaj devigoj kaj malpermesoj en la lingvo“ kaj respekton de lingvaj specifajoj kaj agnoskis la principan rajton de la unuopaj respublikoj mem decidi pri tiu afero, t.e. pri lingvaj aferoj. Por la lingvosciencistoj de Serbio daŭre validis la baza koncepto de la serbkroatismo, kaj daŭre ili rifuzis percepti la serbkroatan normon kiel „abstraktaĵon“, pledante kontraŭ „republikaj lingvoj“ kun pluraj normaj variantoj aŭ varietoj. Male, la serboj deziris la lingvan kaj nacian unuecon trans la republikaj limoj, dum ekskluzivan serban lingvon ili ne postulis. Aliflanke, oni volis starigi iun komision por la koordinado de la subteno de la lingva flegado, kion la reprezentantoj de Vojvodino volis eviti. En la tiea Filologia Fakultato oni vidis en tiu propono la provon de ŝtata kuratorado. En Bosnio Ŝipka rifuzis specifan bosnan normon de la serbkroata lingvo, ĉar li timis bosnian separatismen kaj finfine la disfalon de la jugoslavia federacio. Kun la tendenco de la glorado oni laŭdis la bosnian lingvopolitikon de Hrvoje Ištuk, kroata politikisto en Bosnio-Hercegovino,⁶⁰ kiel „demokratian“ lingvopolitikon, ĉar laŭdire la manipuladoj pere de la lingvo povis esti evitataj kaj la frateco de la muzulmanoj, kroatoj kaj serboj fortigata. En aprilo 1984 en Sarajevo okazis iu konferenco, kies programo devis trakti la temon „lingvo kaj inter-naciaj rilatoj“. Tio donis la okazon bilanci la ĝisnunajn lingvopolitikajn diskutojn. Sed kiel atendeble, ankaŭ ĉi tie regis larĝa diverĝo inter la unuopaj lingvistoj. Finfine, iu partoprenanto proponis la enkondukon de la termino „jugoslavski“⁶¹ por la serbkroata lingvo. Krom tio oni akre kritikis la lingvan difinon ĉe la kroata lingvo, kaj Branislav Brborić de la CK de la Ligo de Serbiaj Komunistoj kondukis la lingvan situacion en Kroatio per jena iom komplika sed penetre sagaca klarigo al la absurdo: „Se la nomo de la laŭnorma lingvo en la Kroata Socialisma Respubliko estas kroata skriblingvo kaj la nomo de la popollingvo estas kroata aŭ serba (kiel ĝi estas skribita en la konstitucio), en tiu kazo oni ne instruas en la lernejoj de la Kroata Socialisma Respubliko – ĉar la lernfako nomiĝas laŭ valida leĝo kroata aŭ serba lingvo – la laŭnorman skriblingvon, sed la lingvon de la diasistemo (t.e. la popollingvon). Se en la lernejoj oni tamen instruas la laŭnorman lingvon anstataŭ la popollingvo (kio estas tutcerta), en tiu kazo la Kroata Socialisma Respubliko estas ne nur la sola jugoslavia respubliko, sed ankaŭ la sola ŝtato en la mondo, kie kadre de la lernfako la laŭnorma lingvo nomiĝas alie ol en la cetera publika vivo.“

La serboj sentas sin en malavantaĝo – komenco de la kampanjo kontraŭ la albanoj

La sekvanta akto de la jugoslavia tragedio estis enkondukita ĉefe flanke de la serboj, kiuj sentis sin troviĝi en malavantaĝo post la adopto de la konstituciaj reguligoj de 1974 koncerne la separon de la aŭtonomaj provincoj Kosovo kaj Vojvodino disde Serbio. Fatalan rolon ludis en tiu momento la verkisto Dobrica Ĉosić,⁶² kiu asertis okaze de festa ceremonio por sia membriĝo en la Serba Akademio de la Sciencoj kaj Artoj (SANU), ke la serboj fariĝis viktimoj de la liberigaj bataloj de la pasintaj jarcentoj, pro kio ili estis humiligataj de aliaj popoloj. La aludo pri la nova konstitucia situacio celis antaŭ ĉio Kosovon, kie grandparte vivis albanoj kaj kie Serbio laŭ la opinio de gvidaj serbaj komunistoj perdis sian ŝtatan suverenecon. Iu serbdevena profesoro pri politologio el Kroatio eĉ konsideris la konstitucion de 1974 malkongrua kun la decidoj de la 2a kunsido de AVNOJ en Jajce (1943), kiu antaŭvidis neniujn aŭtonomajn provincojn. Dum la albanoj argumentis, ke ili formas la grandparton de la loĝantaro de Kosovo, la Serba Akademio de la Sciencoj kaj Artoj replikis, prezentante memorandon de 1986, en kiu la akademiaj membroj publike prilamentis la malavantaĝojn, kiujn la serboj devis elteni per la konstitucio de 1974.⁶³ Oni eĉ parolis pri „fizika, politika, jura kaj kultura genocido“, kiu estas efektivigata de la albanoj de Kosovo kontraŭ la serboj kaj montenegranoj. Krom tio oni temigis la laŭdiran diskriminadon de la serboj en Kroatio. Kvankam la partiaj funkciuloj kondamnis la memoranton kiel „ŝovinisman iniciaton“, ĝia enhavo fariĝis integra parto de la propagando de la serba naciisma gvidanto Slobodan Milošević.⁶⁴ En Serbio oni postulis la nuligon de

⁶⁰ Vd. https://hr.wikipedia.org/wiki/Hrvoje_Ištuk.

⁶¹ Por jugoslav(ia) oni kutimis diri jugoslavenski (kr.) aŭ jugoslovenski (sr.).

⁶² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Dobrica_Čosić.

⁶³ La anglan tradukon de tiu memorando vd. sub engl. <http://de.wikipedia.org/wiki/SANU-Memorandum>. La prezidanto de SANU tiam estis Dobrica Ĉosić persone, sed li ne apartenis al la verkintoj de la memorando.

⁶⁴ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Slobodan_Milošević.

la aŭtonomia statuso de la koncernaj provincoj kaj la restarigon de la malnova konstitucia stato. Per tio la tuta kontraŭ-albana kampanjo estis lanĉita, kaj la serbia gazetaro portis ĝin al la larĝa publiko.⁶⁵

Rezigno pri la jugoslavismo

Kelkajn monatojn post la publikigo de la nomita serba memorando ankaŭ la slovenaj intelektuloj atentigis en la gazeto *Nova revija* pri sia propra nacia programo kaj aludis, ke ili ne plu interesiĝas pri ia „nacia jugoslaveco“ kaj celas klopodi atingi la ŝtatan suverenecon de la slovena nacio en kia ajn formo. La kroata politikisto kaj historiisto Dušan Bilandžić⁶⁶ subtenis la slovenan pledon kaj proklamis la jugoslavan nacion „pura iluzio“. Al la jugoslavoj li konsilis forgesi la esperon, ke iam ajn ili fariĝos propra nacio. Sed tiu ĉi eldiro iom kontrastis kun la plej nova demografia tendenco. En la censo de 1981 la nombro de civitanoj, kiuj deklaris sin jugoslavoj, kreskis al 5,4 procentoj – en la censo de 1971 la kvoto estis nur 1,3%. Kvankam la diferencoj de la opinioj rilate tiun ĉi demandon estis neniam pli grandaj ol nun, neniue de la naciaj politikaj *elitoj* plu interesiĝis konservi la komunan ŝtaton kaj la jugoslavian sistemon ankoraŭ pli longe. Tito forpasis en majo 1980. Lia morto evidente akcelis la centrifugajn tendencojn en Jugoslavio. La jugoslavia socialismo estis ĉiurilate bankrota kaj elĉerpiĝis kiel politika kaj ekonomia sistemo, des pli ke en tuta orienta Eŭropo la komunismo troviĝis en antaŭfina agonio, kvankam la nova sovetia gvidanto Miĥail Gorbaĉov ankoraŭ sence klopodis konservi la socialismon, kiun li volis reformi.⁶⁷

Rilate la diskuton pri la nomado de la serbkroata aŭ kroatserba lingvo oni povus aldoni ankoraŭ la opinion de multaj aliaj teoriuloj, kiuj esprimis sian vidpunkton en tiu verva kontraŭdira debato. Ekzemple Vjekoslav Mikecin, sociologo en Zagrebo kaj fakulo pri marksismo,⁶⁸ konsideris la tutan diskuton pri la modifoj de lingvaj preskriboj „sufiĉe problemlena kaj manipulema“. Li reprezentis jenan ‘skolon’, kiun oni eble povas nomi racia, kiu konsideris la kroatan kaj serban lingvo(j)n „unu kaj sama lingvo“, kvankam ĝi „aperas en du memstaraj variantoj“, kiujn oni povus „kun rajto ti-toli per la koncerna popolnomo“, kio ja „ankaŭ okazas en la ĉiutaga praktiko“. Mikecin rekomendis „esti multe pli prudenta kaj pensema kaj eviti la ofendadon de iu ajn“ kaj donis jenan konsilon: „Se ni ne havas taŭgajn formulojn – kial do ŝanĝi la ekzistantajn kaj estigi nenecesajn tensiojn kaj komplikaĵojn?“ (1989).

Rolo de parlamentoj kaj eklezioj

La iniciaton por unu el la plej lastaj disputoj antaŭ la ŝtata disfalo lanĉis apud la daŭrigata etmilito pri lernolibroj en decembro 1988 la konstitucia komisiono de la kroata parlamento, kiu preferis la formulon „kroata aŭ serba lingvo“ en la oficiala uzado. Milivoj Solar, gvidanto de la koncerna laborgrupo kaj kroata ministro pri kulturo kaj klerigo,⁶⁹ defendis la novan difinon en la parlamento. En januaro 1989 aŭdiĝis last but not least ankaŭ la katolika eklezio de Kroatio per la rekomendo apogi la opinion de la konstitucia komisiono. Okulfrape estis, ke en malferma letero de la eklezio la serboj de Kroatio tute ne estis menciitaj. La organo *Glas Koncila* stilizis la sintenon de la eklezio per la frazoj, ke „la kroata lingvo estas la rezulto de la kroata krea popolspirito“ kaj „la kroata popolo estas unika kaj neestingebla histori-civiliza fakto“, krome la kroata lingvo estas „unika, netuŝebla kaj senfina“ kaj „ĉiu kroato“ estas „portanto de la krea potencialo de la kroata lingvo“ ktp. Ankaŭ Brozović subskribis tiun ĉi deklaraĵon. En aprilo 1989 la konstitucia komisiono de la kroata parlamento finis la prian diskuton kaj publikigis la rezulton en formo de du amendoj, kiuj antaŭvidis en la oficiala uzo de la Kroata Socialisma Respubliko „la kroatan aŭ serban lingvon“ kiel „laŭnorman formon de la popollingvo de la kroatoj kaj serboj en Kroatio, kiun oni nomas ankaŭ kroata skriblingvo kaj kiu estas

⁶⁵ Ĉi-rilate menciindas la parolado de Milošević de la 28a de junio 1989 okaze de la 600-jara datreveno de la „batalo de Kosovo“ en Gazimestan, Kosovo. Kvankam la parolinto ja prezentis sin kiel serban patrioton, utiligante ankaŭ vortojn kiel toleremo kaj egalrajteco inter la popoloj, humanismo kaj demokratio, li rezignis pri eksplicita agresema tono kontraŭ la albanoj, sed li ankaŭ aludis, ke Serbio ne intencos rezigni pri sia rajto je Kosovo. La parolado de Milošević estis poste konsiderata kiel iniciatilo por la sangaj jugoslaviaj militoj de la 1990aj jaroj, kiuj havis klaran genocidan karakteron. Sed por la lingvistikaj diskutoj lia parolado efektive ludis neniun (rektan) rolon.

⁶⁶ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Dušan_Bilandžić.

⁶⁷ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Miĥail_Gorbaĉov.

⁶⁸ Vd. <https://hrcak.srce.hr/file/74838>.

⁶⁹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Milivoj_Solar.

ankaŭ la skriblingvo de la serboj kaj kroatoj“. Nature tuj venis protesto flanke de la Instituto por Lingvo kaj de la Sekcio de la Filologia Scienco de la Jugoslavia Akademio de la Sciencoj kaj Artoj kontraŭ la amendoj kun la postulo antaŭvidi la eblon interŝanĝi la terminojn „kroata skriblingvo“ kaj „kroata aŭ serba lingvo“. Kiel reprezentanto de la serb-ortodoksa eklezio la eparĥio de Dalmatio siaflanke deziris la formulon „serbkroata aŭ kroatserba lingvo“ en la kroata konstitucio. Post tio la serba gazetaro ankoraŭ aldone ĵetis grandan kvanton da oleo en la fajron, starigante la hipotezon, ke la serboj en Kroatio „estas minacataj de genocido kaj asimilado“. En junio 1989 la kroata parlamento voĉdonis kontraŭ la amendoj proponitaj de la konstitucia komisiono koncerne la lingvan difinon en la kroata konstitucio, tiel ke ĉio restis kiel antaŭe. Kiel eliro el la sakstrato ŝajnis resti nur la atentigo pri la prestiĝo de la kroata kaj jugoslava verkisto Miroslav Krleža,⁷⁰ kiu ŝajne iam diris, ke en la kazo de la serba kaj kroata temas pri lingvo kun du nomoj. La renoma zagreba marksismo-fakulo Predrag Vranicki⁷¹ aldonis, ke „la oficiala lingvo en la kroata respubliko, kiu estas tiel nomata laŭ la kroata popolo, kiu formas la plimulton, ne povas fariĝi io alia ol la skriblingvo de la kroatoj, kaj tio estas la kroata skriblingvo“. Laŭ Vranicki, la sama principo validis por Serbio, kie la oficiala lingvo estu nomata „serba skriblingvo“.

Novaj ŝtatoj kun novaj konstitucioj

Sed estis tro malfrue. Jugoslavio disfalis laŭ siaj unuopaj partoj, kaj laŭ la ekzistantaj respublikaj limoj estiĝis novaj naciaj ŝtatoj, kiuj proklamis novajn konstituciojn. Kiam en Kroatio en aprilo 1990 okazis la unuaj liberaj elektoj, venkis la naciisma kaj kontraŭ-komunisma partio HDZ,⁷² kio senprokraste sekvigis novajn iniciatojn por ŝanĝi la ĝisnunan konstitucion, nature ankaŭ rilate la lingvon. En la nova konstitucia teksto de la 22a de decembro 1990 „la kroata lingvo“ skribata per latinaj literoj estis proklamita kiel deviga por Kroatio, kvankam al „unuopaj lokaj regionoj“ estis cedata la rajto utiligi „ankaŭ alian lingvon kaj la cirilan alfabeton“ – nature temis pri nenio alia ol la serboj de Kroatio. La plimulto de la kroataj lingvistoj tuj komencis servi al la politiko de HDZ kaj per tio aktive al la kroata naciismo, ankaŭ Brozović, kiu apartenis al ĝiaj fondintoj kaj vicprezidintoj, fariĝante intima kunlaboranto de la kroata ĝisnuna gvidanto d-ro Franjo Tuđman.⁷³ Sed ne nur tio. La orkestrita agado de kroataj lingvistoj, ŝtataj instancoj kaj gazetaro kondukis al tio, ke oni publike proklamis, ke la kroata lingvo havas propran skriblingvon. Kiam en septembro 1990 la serboj siaflanke adoptis novan konstitucion, oni konservis la „serbkroatan lingvon“ kun cirila skribmaniero kiel oficialan lingvon, dum la latina skribo povis esti oficiale uzata „laŭ la leĝo“. En la konstitucio de la nova „Jugoslavia Federacio“, kiu konsistis en 1992 nur ankoraŭ el Serbio (kun Vojvodino kaj Kosovo) kaj Montenegro, oni fiksas la „serban lingvon kun ekava kaj ijekava prononcoj“ kiel oficialan lingvon kaj la cirilan skribon kiel oficialan skribon, dum la uzado de la latina skribo devis esti reguligita „kongrue kun la leĝo“. En Serbio la lingva ĉpurigo estis efektivigata malpli draste ol en Kroatio.

En Montenegro la lingvisto Vojislav Nikčević⁷⁴ lanĉis la projekton de propra montenegra lingvo, kiu inkludis diversajn fonologiajn kaj morfologiajn dialektajn trajtojn, kiuj klare diferencis de la ĝisnuna serbkroata tradicio. Sed tiu projekto trovis eĉ en Montenegro malfortan eĥon. La plimulto de la montenegroj daŭre utiligas la montenegran varianton aŭ variecon de la serba lingvo, nomante ĝin depende de la politika orientiĝo aŭ montenegra aŭ serba lingvo.

La kroata lingvokverelo eĉ longe postvivis la finon de Jugoslavio. Ekzemple Radoslav Katičić,⁷⁵ kiu apartenis kune kun Brozović, Ivić, Jonke k.a. al la gvidaj lingvistoj de Kroatio, alvokis kiel prezidanto de la Konsilio por la normado de la kroata normlingvo en junio 2007 siajn kolegojn konsi-

⁷⁰ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Miroslav_Krleža.

⁷¹ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Predrag_Vranicki.

⁷² Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Croatian_Democratic_Union, https://hr.wikipedia.org/wiki/Osnivanje_HDZ-a. En 1990/91 50-70'000 membroj shanghis de la Ligo de Komunistoj al HDZ (Mappes-Niediek, Kroatien, S. 84).

⁷³ Vd. <https://narod.hr/clanak/17-lipnja-1989-osnovana-hrvatska-demokratska-zajednica-hdz>. (Ĉefa verkaĵo pri ĉi tiu temo: Brozović, Dalibor. Jedno desetljeće prohujalo, Deset godina Hrvatske demokratske zajednice: 1989. - 1999., ur. Anđelko Mijatović, HDZ, Zagreb, 2009.). 1990 wurde Brozović auch Vizepräsident der Republik Kroatien.

⁷⁴ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Vojislav_Nikčević.

⁷⁵ Vd. https://en.wikipedia.org/wiki/Radoslav_Katičić.

deri la fakton, ke la kroata normlingvo „havas neniun dialektan bazon“, sed ĝi estas „nur konsekvence stilizata“ laŭ la karakterizaĵoj de la novŝtokava lingvo.⁷⁶

En la internacia akademio slavistiko oni trovis pragmatismen solvon: La iamaj kursoj de la serbkroata lingvo komencis esti indikataj en la universitataj programoj nun kiel kursoj de la „bosna / kroata / serba“ lingvo (oni atentu la laŭalfabetan vicon de la terminoj!).⁷⁷

Konkludo

Kiel celas montri la supraj klarigoj, en Jugoslavio ekzistis rilate la lingvan demandon forta malkonsento inter naciismaj kaj ´federaciaj´ lingvistoj, politikistoj, ŝtataj funkciuloj kaj intelektuloj de la kulturo precipe sur la kampoj de la difino de la serbkroata lingvo kaj de la nomado de la naciaj lingvoj. En tio la diversaj flankoj klopodis pravigi sin per plej diversaj argumentoj. Dum en Kroatio oni strebis al kroat-nacie orientita difino de la lingvo, la federaciaj komunistoj reprezentis en ĉiuj respublikoj la ´sankta´ dogmon de la federacia unueco de la jugoslavijaj popoloj, favorante la unuecan varianton de la serbkroata aŭ kroatserba lingvo. Naciismaj kaj separatismaj tendencoj estis kontraŭbatalataj de la Ligo de Komunistoj en la senco de la moto „unueco kaj frateco“, kiu servis kiel gluo por la jugoslavia ŝtateco. La kulmino de la rezisto kontraŭ naciismaj tendencoj estis atingita en 1971, kiam Tito sufokis kaj disbatis la „Kroatan printempon“, kiu celis pli da kultura kaj politika memstareco kaj aŭtonomeco de Kroatio. En la praktiko la diskutoj kaj debatoj de la filologoj turniĝis precipe ĉirkaŭ la demando pri la diferencoj inter la „kroata“, „serba“, „bosna“, „montenegra“ lingvovariantoj kaj estis fokusataj al la klopodo adekvate aŭ ĝuste nomi la unuopajn skrib-, norm- aŭ popollingvojn. La lingvistoj okupiĝis pri dialektaj diferencoj („ŝtokava“, „ĉakava“, „kajkava“) kaj pri prononcado kaj fonetiko de la unuopaj dialektoj („ekava“, „ijekava“, „ikava“) sed ankaŭ pri demandoj de la leksiko, ortografio, gramatiko, sintakso ktp. Serbio insistis pri la uzado de la termino „serbkroata“, dum en Kroatio oni parolis pri „kroatserba“ aŭ „kroata“ lingvo. Kiel dirite, pri tiaj temoj okupiĝis ĉefe lingvosciencistoj kaj filologoj parte kun senlima redundanco. Sed ankaŭ inter tiuj fakuloj regadis malharmonio de la opinioj, tiel ke en ĉiu okazo la partoprenantoj en la diskuto emis rifuzojn kaj nei la opiniojn kaj proponojn de la aliaj. Serboj, kroatoj, muzulmanoj, montenegranoj, slovenoj, makedonoj kaj albanoj perdiĝis pli kaj pli en ĉiam pli groteskaj teoriaj kaj ideologiaj debatoj, tiel ke ili turniĝis ĉirkaŭ la cirklo kaj kondukis la tutan diskuton en la dilemon, aŭ eĉ al la absurdo. La ĝenerala publiko estis apenaŭ tuŝata de tiuj diskutoj. La simpla popolo, inter kiu troviĝis multaj mal-kleruloj, ne povis sekvi kaj kompreni la teoriajn akademian debatojn de siaj elitecaj intelektuloj kaj malinteresiĝis pri ili, havante aliajn, por la ekzistado pli esencajn problemojn por trakti kaj solvi.

Aliflanke ŝajnas ankaŭ, ke la opinio de la parolantoj de la unuopaj lingvoj ne tro interesis la lingvistojn, kvankam la (naciismaj) elitoj ŝajne estis subtenataj de ne malgranda parto de la koncernataj ´bazaj´ ´titolaj´ popoloj en la unuopaj respublikoj, kiuj apogis iliajn teoriojn, ideojn kaj asertojn. De tempo al tempo oni eĉ faris iun (sociologian) enketon aŭ lasis la popolon voĉdoni pri tiu aŭ alia temo, aŭ iuj legantoj esprimis sian opinion en la gazetaro. Pro la ideologia monopolo de la komunisma partio, kiun ĝi rigore defendis, vasta demokratia kaj publika diskuto ne povis okazi kaj la rezultoj de iuj tiaj enketoj verŝajne eĉ estis kaŝitaj antaŭ la publiko. En iu dokumentita enketo de la Zagreba universitato de novembro 1989, en kiu oni demandis 2500 personojn en 18 kroatiaj disktriktoj, la plimulto respondis, ke la serbkroata en principo devas esti konsiderata kiel ununura lingvo. Ŝajnas, ke en la fino ankaŭ la plimulto de la fakuloj en Jugoslavio venis al la sama konkludo, kvankam oni ne tute neis la ekziston de variantoj aŭ variececoj. La lingvistikaj diskutoj verŝajne servis kiel preteksto kaj funkciis kiel katalizilo por trakti naciajn demandojn, kiuj estis subpremataj en Jugoslavio. Entute, la jugoslavia ekzemplo montras, ke la lingva diskuto ne devus esti gvidata tiel kiel ĝi okazis en ti(j) lando(j), ĉar ĝi vole-nevole kondukis al neniun racian kaj akcepteblan rezulton, konkludo aŭ solvo sed finiĝis sole en la sakstrato kiel montris la finfine senutila diskuto pri la demando kiel oni plej taŭge nomu la serbkroatan aŭ kroatserban lingvon. La solan utilon ĝi eble povis havi por levi kelkajn demandojn pri la nacia kaj regiona identecoj.

⁷⁶ La aktuala ortografia praktiko en la lernejoj de Kroatio baziĝas sur la ortografia reguloj de 1996, ĉe kiuj temas pri la 4a eldono de la manlibro por tiu kroata ortografio, kiu estis malpermesata kaj tabuata en 1971 kadre de la sufokado de la „Kroatio printempo“ kaj ekzistis kiel „Londona ortografio“ (Londonac, vd. piednoton 28).

⁷⁷ Pri la diferencoj inter tiuj lingvoj vd.

https://en.wikipedia.org/wiki/Comparison_of_standard_Bosnian,_Croatian,_Montenegrin_and_Serbian.

Post la disfalo de Jugoslavio laŭ unuopaj naciŝtatoj multaj samtempanoj ŝajne komprenis, ke la termino „serb-kroata“ ne plu estas uzebla, ĉar tia nacio aŭ ŝtato ne (plu) ekzistas. Oni komprenis ankaŭ, ke ĉe la kroatoj kaj serboj temas pri speco de sudslavaj ĝemeloj, kiuj estas du diversaj popoloj kun sama lingvo sed diversaj, parte kontraŭdiraj historio kaj kulturo, kiuj eĉ interne havas diversajn subkulturojn (dalmata, slavona, katolika, ortodoksa), kio faras la serbkroatan aŭ kroatserban lingvospacon kvazaŭ unika kazo en la mondo. Ĉu la situacioj de la serboj kaj kroatoj kaj de la serbkroata aŭ kroatserba lingvo estas kompareblaj kun la angla lingvo aŭ la anglalingvaj popoloj, kiel Brozović asertis, estas malklare kaj diskuteble. Estas ankaŭ absolute ĝuste kaj pravigeble, se la unuopaj popoloj de iama Jugoslavio hodiaŭ povas vivi kaj evoluigi siajn proprajn naciajn kulturojn laŭ propraj gusto kaj bontrovo, kio inkluzivas ankaŭ la rajton nomi la proprajn nacilingvojn kroata, serba, bosna aŭ montenegra, ĉar sub la komunismo tiuj etnoj estis minacataj de pereado, degenero aŭ elmortado (ne nur en Jugoslavio). La nova tutmondiĝo de la nuntempo eble povas denove minaci malgrandajn kulturojn per novaj niveligaj aŭ platigaj procezoj, cetere ne nur per la influo de la angla lingvo. Sed en Eŭropo, precipe Eŭropa Unio, la lingvoj de la minoritatoj devas esti subtenataj de la ŝtatoj. En multaj landoj, kiuj antaŭe apartenis al la komunisma mondo, la naciaj lingvoj povis esti savitaj kaj denove prosperas, kiel montras la ekzemploj de la iamaj sovetiaj respublikoj, kie ili funkcias kiel oficialaj lingvoj de la koncerna naciŝtato, de Estonio ĝis Kirgizio.

PS Jugoslavia lingva demando kaj la Esperanto-movado

En certaj medioj de la Esperanto-movado kiel tiu de Zlatko Tišljarić,⁷⁸ fanatika kroata Esperanto-propagandisto el Zagreb/Maribor, oni asertis plene serioze, ke Jugoslavio disfalis, ĉar ĝi ne havis komunan lingvon (en la senco de neŭtrala lingvo kiel Esperanto). El tio oni eĉ deduktis la profetaĵon, ke Eŭropa Unio disfalos, ĉar ĝi ne disponas pri komuna lingvo.

La dubinda aserto de tiaj esperantistoj, ke Jugoslavio disfalis pro la lingva demando, estis verŝajne troigita kaj maltrafis la esencon, des pli ke la kredindeco de tia aserto ne povis esti pruvita. La disfalo de Jugoslavio estas dankata ĉefe al la antagonismoj en la debatoj pri la nacia demando, en kiu precipe la kroatoj kaj slovenoj apogis la separatismojn kaj akcelis la centrifugajn tendencojn, dum la aliaj respublikoj estis federacie orientataj kun la deziro konservi la komunan ŝtaton. En tio ili ege profitis de Kroatio kaj Slovenio, kiuj troviĝis sur pli alta ekonomia nivelo. La ĉefaj kaŭzoj de la disfalo de Jugoslavio tamen estis esence politikaj kaj ekonomiaj, koincide kun la (tutmonda) krizo de la komunismo (aŭ socialismo), pri kiu la politika elito de Jugoslavio rezignis favore al nacia solvo.

La hipotezo pri la manko de komuna jugoslavia lingvo en la senco de Esperanto devas esti konsiderata kiel ĥimero en la formo de intelekta fikcio, kiu estis reprezentata de kelkaj naivaj fantaziuloj, kiuj pensis pure ideologie. La serbkroata aŭ kroatserba lingvo havis duoblan lingvo-politikan karakteron: Unuflanke ĝi estis uzata de la „jugoslavo“ de Slovenio ĝis Makedonio kiel supera federacia lingvo, kie aliflanke ĝi trovis kontraŭstaron ĉe nekroatoj kaj neserboj, kiam ili perceptis tiun lingvon kiel altruditan hegemonian rimedon. Similajn kontraŭajn reagojn montris montenegroj, kiam Belgrado aŭ Zagrebo volis enplanti en Montenegro la ekavan aŭ ijekavan varianton de la serbkroata aŭ serba skriblingvo. La popoloj de Jugoslavio reagis ege alergie, se oni provis malavantaĝigi ilin per la naciaj ambicioj kaj pretendoj de aliaj. Ilia admirinda sento (ekzemple lingva) pri egalrajteco tragike pereis kune kun la jugoslaveco en la militoj de la 1990aj jaroj.

La demando, ĉu principe nova komunslava (jugoslava) lingvo estus povinta esti kreita sur artefarita bazo, evidente neniam estis serioze diskutata kaj devas esti konsiderata kiel pura spekulativo. Kiel supre menciite, la proponita termino „jugoslavski“ trovis neniun popularecon en Jugoslavio, kaj en censoj deklaris sin kiel „jugoslavo“ nur malgranda minoritato de civitanoj de Jugoslavio. Tiu nova lingvo estus devinta respekti ankaŭ la slovenan kaj makedonan kaj eĉ la albanan, hungaran kaj italan lingvojn, ekzemple laŭ la modelo de Rumantsch Grischun, kiu estis publikigita en 1982 en Svislando kiel projekto de komuna lingvo por la retoromanĉaj dialektoj.

Nu, la esperantistoj, inter kiuj ekzistis ankaŭ konvinkitaj adeptoj de la jugoslavia federacia modelo, utiligis tiun ideon unuavice por propagandi Esperanton. Cetere, en 1972 Slovenia Esperanto-Ligo faris al la politikistoj la neoficialan proponon utiligi Esperanton por la interna uzado. La absurda

⁷⁸ Vd. https://eo.wikipedia.org/wiki/Zlatko_Tišljarić.

situacio de la lingva diskuto eĉ atingis la jugoslavian Esperanto-movadon. Kiam en 1987 okazis la plej lasta kongreso de Jugoslavia Esperanto-Ligo en Banja Luka (Bosnio), la kongresa regularo permesis la uzadon de ĉiuj oficialaj lingvoj de Jugoslavio kiel laborlingvoj, plus Esperanto. Sed la kroataj esperantistoj protestis kontraŭ tiu reguligo kaj postulis, ke Esperanto estu akceptita kiel sola lingvo de la konferenco. Ŝajnas, ke en la praktiko aperis problemoj kun la Esperanto-traduko, tiel ke la unuopaj partoprenantoj devis uzi la serbkroatan kaj slovenan por esti komprenataj de la aliaj kaj samtempe mem tradukis siajn prelegojn al Esperanto, kio faris iom kuriozan impreson kaj kaŭzis enorman tempoperdon. Laŭ la legendo, Tito mem lernis Esperanton en la malliberejo kaj bonvole rilatis al la Esperanto-movado, tiel ke la jugoslaviaj esperantistoj povis profiti de lia protekto ĝis la fino. Pro tio Tito estis multe admirata kaj alte estimata de la Esperanto-movado, kvankam post la likvido de titoisma Jugoslavio evidentiĝis, ke ankaŭ tiu komunisto estis klasika stalinisma krimulo, kiu respondecis por senombraj krimoj plenumitaj en Jugoslavio,⁷⁹ pri kiuj laŭ hodiaŭaj kriterioj verŝajne devus okupiĝi iu internacia tribunalo pri militkrimoj kaj homaj rajtoj, se Tito ankoraŭ vivus, kiu devus trakti lin laŭ sama maniero kiel sinjorojn Milošević, Karadžić, Mladić kaj aliajn.

Andreas Künzli, septembro 2018

Koncerne la solvon de la -ata-/-ita-demando, mi ĝenerale orientiĝis laŭ la germanlingva modelo (war/wird/wurde depende de la tempo, plej parte pasinteco). Sed la tuta problemo estas komplikata/ita per la dimensioj de la adjek-tiva, tranzitiva kaj verbaspekta demandoj. Do, restas dubo en kelkaj kazoj (devigita/ata, akompanita/ata, miskom-prenita/ata, konsiderita/ata, nomita/ata, imagita/ata k.s.), pri kiuj oni povas verve diskuti.

© www.planlingvoj.ch / www.zamenhof.ch, septembro 2018.

La (svisa) aŭtoro, nask. en 1962, studis slavistikon, orienteŭropan historion kaj internacian juron en la Zurika universitato. La studojn li finis en 1992 per licencia verkaĵo pri la historio de Esperanto kaj interlingvistiko en Ruslando kaj Sovetunio kaj estis diplomita per la titolo lic. phil. (M.A.). En la 1980aj jaroj kaj poste li plurfoje vizitis Jugoslavion. Esperantisto de 1979. Retestro de www.osteuropa.ch (ankaŭ: www.balkan.ch kaj www.slavistik.ch).

1

⁷⁹ Vd. http://www.planlingvoj.ch/Tito_Jugoslavio.pdf.